Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 11-an de januaro 2023 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**
La tagordo aprobiĝis.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 7-an de decembro 2023**
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

**3. Interna kaj alekstera informado**

**Norvega Esperantisto**: La numero 3/2023 estis finredaktita la 22-an de decembro. Ĝi estos presita kaj dissendita ene de unu semajno. Ni planas eldoni kaj dissendi numeron 1/2024 komenco de marto.

**Starigo de novaĵletero:** La unuan retan novaĵleteron ni sendu al tiuj retadresoj, kiujn ni jam havas. Ni ankaŭ anoncu la aperon de novaĵleteroj en nel-inform kaj NE.

**4. Telefono en Esperantonia.** Ni havu kontaktnumeron de NEL ĉe la prezidanto (Bård) per elektronika simkarto en lia jama telefono, kaj ni uzu la malmultekostan monatan servon «Ice løpende», kiun ofertas al ni ICE.

**5. Stato de Esperantonia.** Oni aĉetu polvosuĉilon por anstataŭi la malnovan, ne plu funkciantan.

Marianne legu kaj prizorgu unufoje semajne retmesaĝojn alvenintajn al NEL.

Ni esploru, kiom da ŝlosiloj de Esperantonia ekzistas kaj kie ili troviĝas.

**6. Printempaj kursoj**
Marianne sendos al la estraro proponon pri datoj de printempaj retkursoj por komencantoj kaj progresantoj, kaj ni aperigos informojn pri la kursoj en Facebook kaj aliaj informejoj.

**7. Rezulto de membrointervjuoj**
Prokrastita

**8. Jarraporto 2023**
Dum la venonta estrara interkonsiliĝo ni diskutos, ĉu simpligi la formaton de la jarraporto, kaj ni disdividos inter la estraranoj la taskojn verki la raporton.

**9. Ĉu landa kunveno en 2024?**
Ni decidis ne organizi landan kunvenon en 2024.

**10. Eventualaĵoj**
Astrid Mansrud, honora membro de NEL, mortis la 1-an de januaro 2024. Marianne prizorgos florsaluton al la entombiga ceremonio kaj informon en nel-inform. Aperu nekrologo en Norvega Esperantisto 1/2024.

**11. Venonta estrara interkonsiliĝo**
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 15-an de februaro 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund